



LA VERDA TRISKELO

2 numéros par an - parution : printemps / automne
VT 55 – oktobro 2025



Jen la aŭtuna VT ! Dankon pro la multaj artikoloj.

Bonan legadon al ĉiuj .

Enhavo

Edito	P 2
La Federacio	p 3
Lokaj korespondantoj	p 4
Rilate al heredaĵo	p 5
Ora ulekso	p 7
Okazis ...	p 8
... kaj okazos	p 15
Anoncoj	p 17
Fremdaj vizitantoj	p 18
Prelegoj	p 20
Sumoo legado	p 23

COTISATION 2025

- y avez vous pensé ? -

Même si vous ne suivez pas de cours,
même si vous n'êtes pas actif, soutenez
l'Espéranto et restez informé.

Adressez-vous soit à votre correspondant
local si vous adhérez à un club, soit à
Xavier Godivier (coordonnées p.4)
pour adhérer à la fédération
uniquement .

AUX INTERNAUTES

Site internet :

<http://bretonio.esperanto-france.org>

Pour vous inscrire à la liste de diffusion
Bretonio et ainsi recevoir des nouvelles,
plus fraîches et plus nombreuses,
envoyez un message vide à l'adresse :
bretonio-abono@esperanto-france.org

La federacio bezonas vian helpon!

Nia lasta membrokunveno okazis en Nanto, dum la sukcesa nacia kongreso. Estis tamen okazo konstati ke mankas nuntempe fortoj ene de la komitato por kontentige prizorgi la administradajn taskojn de la federacio.

Tiuj taskoj nek ampleksas nek malfacilas sed la samaj aktivuloj ne povas fari la saman laboron dum tro multe da jaroj, despli se ili havas aliajn pli temporabajn taskojn, por la nacia nivelo kiel via prezidanto aŭ por Greziljono kiel via kasistino. Ni do alvokas vin serioze pripensi helpi la federacion por zorgi pri ĝia funkciado.

Por faciligi la administradon, la komitato subtenas la aliĝon al la komuna kotizsistemo de Esperanto-France. Jam kvin bretonaj asocioj partoprenas ĉi jare: Armor, Rennes, Pluezek, Hennebont kaj Lorient. Ĉiuj iliaj membroj estas do samtempe membroj de la nacia, regiona kaj loka nivelo. Invitu vian lokan asocion fari same, ni tiel kunigas niajn fortojn por la prospero de Esperanto en Bretonio kaj Francio!

Bonan legadon de via aŭtuna revuo kaj ĝis baldaŭ en venontaj eventoj, vidu en la lasta paĝo por la listo!

Xavier Godivier

La fédération a besoin de votre aide !

Notre dernière AG s'est tenue à Nantes, lors du congrès national, qui a été un grand succès. Cependant, l'AG a permis de constater le manque de forces au sein du CA pour assurer efficacement les tâches administratives de la fédération.

Ces tâches ne sont ni lourdes ni complexes, mais les mêmes actifs ne peuvent pas assurer le même travail pendant trop d'années, surtout s'ils ont d'autres tâches plus chronophages, comme votre président au niveau national ou votre trésorière à Grésillon. Nous vous invitons donc à envisager sérieusement d'aider la fédération pour son fonctionnement.

Pour faciliter l'administration, le CA soutient l'adhésion au système de cotisation commune d'Espéranto-France. Cinq associations bretonnes y participent déjà cette année : Armor, Rennes, Plouézec, Hennebont et Lorient. Tous leurs membres sont donc à la fois membres des niveaux national, régional et local. Invitez votre association locale à faire de même ; ainsi, nous unissons nos forces pour le rayonnement de l'espéranto en Bretagne et en France !

Bonne lecture de votre magazine d'automne et à bientôt pour les prochains événements, rendez-vous en dernière page pour en voir la liste !

Xavier Godivier

L'exposition sur Lucien Péraire lors du congrès de Nantes



Aranĝo : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - helene22dubois@gmail.com - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 - chantalallen9@gmail.com korektado Josette Ducloyer jducloyer@gmail.com

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

Des nouvelles de Espéranto-Rennes

Esperanto-Rennes a effectué sa réunion de rentrée le 8 septembre 2025, avec son nouveau président Pierre Vittet qui a la volonté de réanimer l'association qui était plus ou moins en léthargie depuis plusieurs années.

L'association est présente sur quelques réseaux sociaux:

- liste de diffusion courriel: il est possible de s'abonner en envoyant un courriel vide à esperanto_rennes-abono@esperanto-france.org.
- Telegram: <https://t.me/+cLyEPCBUpzkwYjVk>.
- Facebook: <https://www.facebook.com/profile.php?id=61575613296104>.

Des activités régulières sont mises en place :

- Cours d'esperanto avec Xavier: tous les vendredi, à partir du 19 septembre, à 18h30 au siège de l'association rennaise, 18, rue du Doyen Colas. Xavier sera également à disposition à cet horaire pour des informations et conseils d'apprentissage.
- Après-midi jeux avec Jannick: le mercredi 5 novembre à partir de 14h puis tous les premiers mercredi du mois
- Permanence (ouverture bibliothèque par Pierre): les mercredi de 18h30 à 19h30

Autres projets :

- Au mois de janvier, une uruguayenne espérantophone nous présentera son pays (la date et le lieux seront confirmés).
- Nous prenons contact avec une association café des langues pour proposer notre participation.

J.D.

Nova horaro de Esperanto-Lannion

Se iu demandas pri la kursoj en Bretonio, sciú ke la horaro en Lannion ŝanĝiĝis. Nun, nia babila kunveno okazas en "Espace Ste-Anne" à Lannion merkredon, de 17h30 ĝis 19h.

Maja

Lokaj korespondantoj kaj kursoj.

22	Armor Esperanto	Murielle Caré	06 70 60 58 18	murielle.care(a)me.com
22	Saint-Brieuc	Laurent Peuch	06 89 86 12 97	ltpeuch(a)hotmail.com
22	Plouézec	Jeanne Pouhaer	09 62 30 40 05	jeanne.pouhaer(a)orange.fr
22	Locquémeau-Cavan	Anne Desormeaux	06 04 01 27 64	anne_desormeaux(a)yahoo.fr
22	Lannion	Maja Mériaux	06 04 49 84 48	meriaux.family(a)wanadoo.fr
22	Pleudaniel	Pierre Cardona	06 99 38 20 89	kortep(a)gmail.com
22	St Michel-en-Grève	Hélène Dubois	02 96 35 73 06	helene22dubois(a)gmail.com
22	Rostrenen	Françoise Noireau	06 09 12 03 74	desirdapprendre(a)gmail.com
22	Dinan	Philippe Stride	02 96 27 87 43	<u>philippe.stride(a)wanadoo.fr</u>
29	Douarnenez	Chantal Allen	06 74 15 78 09	chantalallen9(a)gmail.com
29	Morlaix	Claudine Guégen	06 86 88 44 69	Esperantosolidareco(a)gmail.com
35	Rennes	Xavier Godivier	06 51 45 84 83	xgodivier(a)esperanto.org
35	Montfort-sur-Meu	Josette Ducloyer	06 35 32 02 00	jpducloy(a)gmail.com
35	St Malo	Anne-Marie Argney	02 99 40 24 86	amargney(a)gmail.com
56	Hennebont	Yvette Veslin	02 97 36 08 75	herve.veslin(a)orange.fr
56	Lorient	Jean dit Yannick Le Guennec	06 78 59 98 56	jean.le-guennec(a)wanadoo.fr
56	Hennebont+Lorient	Claude Bensimon	06 22 08 29 32	cloesb(a)yahoo.fr
56	Pontivy	Marielle Giraud	02 97 27 76 98	liber.terre(a)wanadoo.fr
56	Rhuys	Francis Desmares	02 97 26 89 96	francismsg56(a)gmail.com
44	Nantes	Bruno Robineau	02 40 98 78 76	brobineau(a)orange.fr
44	St Aignan-de-Grand Lieu	Solange Goan	06 81 18 30 12	somigoan(a)gmail.com
44	Couëron	Luc Gouverneur	06 30 03 00 98	coueron-esperanto(a)orange.fr
44	Herbignac	Jean-Yves Santerre	02 40 88 96 98	jys.mys(a)club-internet.fr
44	St Nazaire	Chantal Barret	02 40 01 97 27	patchdomo(a)yahoo.fr

NB- "(a)" est utilisé à la place de "@" dans les adresses courriels données dans le VT pour éviter que ces adresses soient spammées suite à la diffusion du VT sur Internet.

On a pu faire des erreurs de copie, veuillez contrôler vos coordonnées et si vous constatez des erreurs ou changez de coordonnées, veuillez en aviser Josette Ducloyer. Merci d'avance !

Le VT est diffusé par internet. Cependant, nous encourageons les responsables de club à en imprimer un exemplaire lors de la diffusion pour que les membres soient sensibilisés à sa sortie.

Malnovaj leteroj senditaj al Gaby Tréanton dum la jaroj 1951-58

Kun la klubo de Lannion, ni aktuale legas kaj ordigas leterojn, kiujn Gaby Tréanton ricevis de siaj esperantistaj korespondantoj. Mi elektis nur pecetojn. Pri kelkaj el tiuj korespondantoj Gaby parolas en sia libro. Maja

1951

Karl kaj Anna Ulström. Stockholmo. Svedio.

22.05.51

... Ĉi tie nun estas printempo kaj la arboj verdiĝas kaj floras en la arbaro. Jes, arbarojn ni havas en la urba ĉirkaŭaĵo, kaj mi ĝojas je la penso, ke baldaŭ vi povos ankaŭ promenadi en la arbaro kaj rigardi la lagetojn, aŭdi la birdojn, ktp.

Leena Stierman. Rotterdam. Nederlando

01.11.51

Kaj jen, kara Gaby, Simon estas for kaj mi do plu interbabilas kun vi. Tutkore mi substrekas ĉion, kion Simon jam skribis al vi. Ho, mi ŝatus, ke vi loĝus pli proksime por ke ni ambaŭ povus helpi vin. Helpi nian karegan malgrandan fratineton, kiu meritas esti iom dorlotata de multaj, sed kies geamikoj loĝas ja tiom fore. Ni do ripetas nian inviton : venu al ni dum la tutaj ferioj de decembro kaj januaro. Ni dorlotus vin, por ke vi pli kuraĝe povu reiri al via insulo, tre agrabla en la somero, sed por vi tro izolita dum aŭtuno kaj vintro.

Vi certe opiniis, ke ni forgesis vin, kara ! Sed nur mankis la tempo, finfine nia vivo reprenis la tutnormalan iradon. En septembro ni propagandis por nia lingvo, vendis gazetojn, okazigis publikan kunvenon, kie ĉeestis kvin ne-esperantistoj, kaj la rezulto ? Sep kursanoj en nia kvartalo. Do tamen nova elementa kurso. Mi esperas tutkore, ke ĉiuj restos la tutan kurson, mi faros mian eblon !

1958

Ruĵa. Sofia. Bulgario.

19.05.58

Vi ne devas malkuraĝiĝi, kara, sciante, ke ni nun elvivas la rezulton de niaj pasintaj eraroj. Mi ankaŭ, kvankam de longe vegetaranino, eĉ krudmanĝantino, mi antaŭ kelkaj jaroj preskaŭ mortis. Mi ekkonis tiamaniere la veron : la amo naskas la vivon – mi persone provis tion !

Foje mi estis kulpa antaŭ dekduo da homoj, kiujn mi nevole devigis atendi min (mi partoprenis en frata orkestro, kaj mi malfruiĝis, estinte studentino, ĝuste antaŭ matematiko-ekzameno). Ĉiuj muzikantoj estis homoj, okupitaj per diversaj laboroj, kaj ili koleris pri mia malfruiĝo. Kiam mi alvenis, neniun riproĉis min. Reveninte hejmen, mi sidiĝis tuj antaŭ miaj lerniloj. Subite, iaj fortegaj, akredoloraj pikadoj mi eksentis rekte en mian koron. Kaj ĉesis mia spirado duone : mi povis nek enspiri, nek elspiri. Timigita pro la daŭra fenomeno, mi ne sciis kion fari -tiel-senmova pro dolora, senspirema. Ŝajnis al mi, ke mi mortis ! Tiumomente mi havis la bonan personon, komencis preĝi, preĝi tutanime. Mi petis pardonon, unu post la alia, al mia ofendita kolegaro (ĉar, fakte, mi sentis min kulpa!). Post la lasta persono, la peniga doloro tuj malaperis, mi komencis libere respiri kaj... ploris pro danko !

23.12.58

Krom la danko pri via amikeco, mi elkore ĝojas pri la pliboniĝo de via sano.

Tian similan laciĝon, senfortecon mi ankaŭ spertis dum kelkaj jaroj kaj fine feliĉe mi liberiĝis kaj plifortiĝis.

Mi sendas al vi poemon, kiun mi verkis.

La montaro

Jen, nebuloj re-alvenas
kiom foje de l'maten ?
La aer' printempserenas
en la koro ĝojfesten' !

Travideblas vualitoj
La ĉiela porcelan',
Suproj, lago glacigita
kiel tra rigard' de l'am'.

Kuratingi volas jen,
scivolema nebulet'
malproksiman pinton
je najbar' en mort silent'.

Ĝin kisinta, fulmrapide
retroflugas al la lag'.

Kuŝas sure am-konfide.
Frem-ondiĝo... eĉ sen frag'.

Lago, silkaj nebuletoj,
trapenetra suna bril',
en la koro ĝojvarmeto,
ĉu revenas vivapril' ?

Ĉi matenon la montaro havis novan vundon :
lago – tute glaciĝinta ! Meze de l'abundo
neĝa, grizmalhela, ĝi kontrastas ĉagrenveke
al la rusla blank-kovrilo – tutkovrinta venke.

Kuŝas – vundo kreva – lag' senspira, senanima :
meze de l'montaro – dorm', glacie pantomima !
Nur la sango de la monto - « sub surdi ne » brua -
per la akvofalo laga pluas kaj elfluas...,
kaj forportas vivon al la kampoj fruktodonaj,
vivon, naskiĝintan inter montaj pintoj ŝtonaj.

Pri Lucien Péraire

Eke de Junio, Helene kaj mi plezuris partopreni en la jarkunveno de EsperantoFrance kiu okazis tute glate en Nantes kun pli ol 150 esperantistoj.

Inter la buntaj programeroj, okazis tre interesa prelego pri la heredaĵo kiun lasis elstara franca esperantisto Lucien Péraire (https://fr.wikipedia.org/wiki/Lucien_Péraire).

Kiam li estis juna, li estis fervora esperantisto sed ankaŭ talenta sportisto. Inter 1928 kaj 1932, li biciklis pli ol 30 000 kilometroj tra Eŭropo kaj Azio, uzante ĉefe la esperantaron por interrilati kun tutlandaj homoj.

Impona universitata esplorada laboro ebligis al ni retrovi la grandan heredaĵon, kiun ĉi tiu granda pac-amanto lasis al la mondo : <https://peraire.huma-num.fr/fr>

Libro verkita (PDF) de Lucien Péraire : <https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/5829>

Jean-Claude



ORA ULEKSO estis gazeto eldonita de la klubo de Rennes de 1951 ĝis 1965. La redaktoro estis Clément Martin. Aperis 98 numeroj, kiuj la plej ofte temas pri bretona geografio, interesaj por turismi tra nia regiono.

Anne-Marie Argney, de la klubo de Saint-Malo, donacis al nia federacio kelkajn ekzemplerojn, kies artikoloj iom post iom estos retajpitaj de Chantal Allen. Jen unu pri Lokronan.

No 23 Marto 1954

LA GRANDA TROMENIO

Ĉu vi deziras vidi aŭ ĉeesti malbanalan vidindaĵon ? Tiam, nenio estas pli eksterordinara ol la « GRANDA TROMENIO ».

TROMENIO? Kio estas tio?... Certe vi ne trovos tiun neologismon sur via Plena Vortaro! Ĝi estas la nomo de festo kaj procesio, kiuj okazas ĉiujn ses jarojn en Lokronan, je 17km norde de Kemper.

Tiu urbeto estas nedubeble unu el la plej pentrindaj. Ĝia tuta ĉefa placo kun la malnovaj domoj, puto, preĝejo, kapelo k.t.p. estas enklasigitaj kiel historiaj monumentoj.

Ĝi sidas flanke de pitoreska monteto, el kie la vidaĵo estas senkompara. Dum almenaŭ tri jarcentoj, precipe ĝis la mezo de la XVIIIa jarcento, Lokronan estis fama en la tuta mondo por ĝiaj tolfabrikaj. Ĝiaj tolteksistoj estis la plej lertaj kaj liveris veltolojn al multaj ŝiparoj, i.a. al la potenca Hinda Kompanio. Bedaŭrinde, post tiu longdaŭra kaj brila prospero, la nigra alruiniĝo iom post iom falis sur l'urbeton, la teksiloj silentis.

Hodiaŭ Lokronan estas nur tre malgranda urbeto kun malpli ol 800 enloĝantoj...

Ĝi ŝuldas sian nomon al ĝia patrono Ronan aŭ Renan. Kiel multaj aliaj sanktuloj, li venis ĉirkaŭ la mezo de la sesa jarcento el Irlando por prediki al la tiama maldensa loĝantaro la Kristan evangelion... Li varbis multajn adeptojn. Hodiaŭ oni povas admiri en la kapelo de Penity, apud la preĝejo, la tombon de Ronan.

La Granda Tromenio celas memori la vivon de Ronan. Ĝi disvolviĝas tra monto, kampoj, vojeto kaj ampleksas pli ol dek du kilometrojn. Ĝin partoprenas procesioj el la ĉirkaŭaj paroĥanoj kaj pluraj muzikistaroj.

La legendo aldiras ke kiu ne faras dum sia vivo, ĝin devos fari post sia morto, antaŭenirante nur ĉiutage la longon de sia ĉerko...



Ch. Le Séac'h UEA delegito kaj veterano. Lok Maria Quimper

Okazis...esperanto festas en Rostrenen , 18an -23an de Marto

Antaŭtempa alveno kaj bonveniga akcepto en Rostrenen

Jozefo (Józef Cześćnik), fama pola esperantisto, alvenis en Rostrenen kun sia edzino Anja kaj ilia filino Milena unu tagon pli frue ol planite. Milena, neparola aŭtistino, povas elparoli unu frazon en Esperanto (por peti nazpaperon). La pola familio montriĝis idealaj gastoj dum sia tuta restado.

Favora fono: La Semajno de Lingvoj

Ilia alveno okazis kadre de la Lingva Semajno, jam lanĉita de Caroline WEPIERRE (Kalio), esperantista instruistino en la publika lernejo de Rostrenen.

Ĉi tiu instruistino, kiu gvidas lernantojn de 8-9 jaroj, malkovris Esperanton unu jaron antaŭe danke al la vizito de Peng, ĉina esperantisto, kaj tuj decidis diskonigi ĉi tiun malkovron kun siaj gelernantoj per partopreno en lingvaj projektoj.

En septembro, ŝi partoprenis la Eŭropan Tagon de Lingvoj, kaj en marto ŝi lanĉis la Lingvan Semajnon en la lernejo.

Marde, la 18-an de marto, la Lingva Festivalo jam prezentis multajn budojn en la granda festosalono, inkluzive de granda stando dediĉita al Esperanto, danke al la aktiva subteno de Noël REYSSET kaj Alain BOURNEL, kun iliaj ludoj kaj gestokantoj.

Pedagogiaj lingvaj kaj kulturaj intervenoj

Vendrede, la 21-an de marto 2025 matene, Jozefo estis invitita paroli en du klasoj: tiu de Kalio kaj tiu de infanoj de 10-11 jaroj. Ĉiu klaso havis ĉirkaŭ 25 lernantojn. Li entuziasme kaj malavare prezentis sian naskiĝurbon, Gdańsk, situantan en norda Pollando.

La lernantoj de Kalio, jam iniciatitaj en la bazojn de Esperanto ekde septembro, fiere ekparolis kun la gasto en ĉi tiu lingvo, kreante spontanajn kaj kortuŝajn interŝanĝojn. Kelkaj knabinoj eĉ donacis al Jozefo papere eltranĉitajn uĝajn korojn, simbolan geston de internacia amikeco.

Post siaj prezentoj, la pola amiko donacis al la du instruistoj turismajn broŝurojn kaj librojn, kaj al ĉiu lernanto permane ilustritan mapon de Gdańsk.

Poezio, kreemo, amikemo

Samtage posttagmeze, Jozefo kaj Anja partoprenis en la Monda Tago de Poezio, organizita de UNESKO, okazinta en la biblioteko. Ili deklamis poemojn en la pola kaj Esperanto antaŭ ĉiuj lernantoj de la lernejo. La poemo elektita de Jozefo, aparte sonesprima, estis plena de aliteracioj kaj akompanata de sonefektoj imitantaj lokomotivon aŭ

trajnon. Kun inspiriga pedagogia aliro, li petis al la infanoj fermi la okulojn por pli bone aŭskulti kaj diveni la temon de lia pola poemo.

Maja MÉRIAUX kaj aliaj esperantistoj ankaŭ ĉeestis, legante hajkojn en Esperanto, pliriĉigante ĉi tiun multkulturan poezian feston. Filmteamo dokumentis la tutan eventon, registrante ĉi tiujn valorajn elpaŝojn.

La vespero daŭris kun la alveno de Munjo CARÉ, varmigante amikecon inter esperantistoj kaj pli profundan interkonon kun Jozefo kaj Anja.



Scienca prelego en Esperanto

Sabate, la 22-an de marto posttagmeze, Jozefo prezentis pli sciencan ol filozofian prelegon pri la origino de la universo, akompanatan de bildprezentajo. Ĉi tiu prelego, farita en Esperanto, havis samtempan tradukon en la francan, farante ĝin alirebla por ĉiuj partoprenantoj. Dek du personoj ĉeestis, inkluzive de la lernejestrino kun sia filino, studentino de fiziko — signo de intereso trans la pure lingva kadro. Jean-Yves JEGOU ankaŭ honoris nin per sia ĉeesto.

La interŝanĝoj estis aparte viglaj, kun multaj demandoj kaj aktiva partopreno de la publiko. Kiel por la aliaj eventoj, la filmteamo registris la tutan prelegon.

Loka eĥoo kaj promocio de Esperanto

La vizito de Jozefo kaj lia familio generis palpeblan entuziasmon por Esperanto en la regiono. Du personoj — unu en Trémargat (norde) kaj alia en Mellionnec (sude) — esprimis deziron lanĉi Esperanto-kursojn en sia vilaĝo.

La efiko de la laboro de Kalio rimarkiĝis ankaŭ ekster la oficiala kunteksto: patrino de lernanto spontane esprimis sian entuziasmon pri la malfermo al la mondo, kiun la instruistino ebligas, precipe per Esperanto, kiun ŝi instruas al ĉiuj siaj lernantoj ekde septembro.

Ekster la oficialaj eventoj, profundaj interparoloj okazis kun la pola familio, ekzemple pri lingva precizeco, sed ankaŭ pri aŭtismo kaj pri la malsamaj aliroj en Pollando kaj Francujo.

Perspektivoj en la lernejo kaj por plenkreskuloj

Post ĉi tiu semajno plena de interŝanĝoj, pluraj projektoj aperis por disvastigi Esperanton en la regiono:

- Regulaj intervenoj en la klaso de Kalio?
- Korespondado kun itala klaso kaj infanaro en Bukavu (Kongo), urbo nune en milito?
- Eblaj Esperanto-kursoj en tetrinkejo en Rostrenen?
- Etendo de kursoj al najbaraj vilaĝoj, precipe marde (bazartago en Rostrenen) por kunhavigi veturojn?

Fino kaj foriro

Dimanĉon matene, la pola familio foriris el Rostrenen, lasante multajn konkretajn memorojn: librojn, turismajn broŝurojn en Esperanto, specialaĵojn por gustumi... Jozefo aparte donacis kvin ekzemplerojn de sia lasta verko.

Nur longdaŭra projekto povos informi pri lingva hegemonio, lingva diskriminacio, defendi lingvan kaj kulturan diversecon, kaj promocii plurlingvismon kaj la rolon de Esperanto kiel pontolingvo.

Plue, en elementa instruado, Esperanto havas esencan pedagogian kaj metalingvistikan rolon por prepari infanojn al lingva malkovro. Konkrete, ĝi ebligas:

- al nefranclingvaj infanoj valorigi sian denaskan lingvon kaj pli bone integriĝi;
- al ĉiuj lernantoj evoluigi lingvan scivolemon kaj kulturmalfermitecon;
- enkonduki komunikajn ludojn, kiuj faciligas lernadon de vortprovizo kaj gramatikaj strukturoj;
- antaŭenigi respekton kaj egalecon inter lingvoj ekde frua aĝo.

Ĉiuj eventoj de la Lingva Semajno estos valorigataj per unuhora podkasto por la loka radio kaj per retejo. Ĉi tiuj materialoj ankaŭ helpas akiri subvenciojn por la venontjara eldono de la evento, en 2026.

La vizito de Jozefo kaj lia familio restos en la memoro kiel forta momento de kultura kaj lingva interŝanĝo, denove pruvante la kapablon de Esperanto krei pontojn inter kulturoj kaj generacioj.

Françoise NOIREAU

Okazis...Pluezek 24an-25an de aŭgusto

Les estivales d'espéranto de Plouézec ont réuni les samedi 24 et le samedi 25 août, une quarantaine d'espérantistes. Au programme :

- proposition de cours (avec deux excellents et renommés animateurs :
 - Pawel Fischer-Kotowski, espérantiste polonais qui animait des ateliers lors du congrès mondial d'espéranto

qui a eu lieu en juillet à Brno en République Tchèque.

- Ewa Grochowska qui a reçu de nombreux prix mondiaux pour ses nouvelles et ses poésies en espéranto.
- Chantal Allen, espérantiste française, animait des ateliers d'expression orale, comme lors du congrès Esperanto France à Nantes.

- Conférences : le Liban aujourd'hui, l'histoire des congrès mondiaux d'espéranto depuis le premier en 1905.
- Des ateliers : Origami, boulier japonais et jeux en espéranto.
- Des excursions: deux groupes sont allés à la Croix des Veuves et ont écouté en espéranto l'histoire de « Sorbonne plage ».

Certains sont allés, le samedi soir, au concert de Gospel à l'église de Plouézec et d'autres sont allés danser le dimanche avec les gens du village. La choucroute de la mer de la maison Oger a ravi les convives.

Alors on se donne rendez-vous à nouveau l'an prochain, pour trois jours cette fois-ci du vendredi 21 au dimanche 23 août 2026.



La Somera Esperanta Festivalo de Plouézec kunigis ĉirkaŭ kvardek esperantistojn sabaton, la 24-an kaj dimaĉon, la 25-an de aŭgusto.

La programo proponis:

- kursojn (kun du elstaraj kaj renomaj kvidantoj :
 - Pawel Fischer-Kotowski, pola esperantisto, kiu gvidis laborrenkontiĝojn dum la Universala Kongreso okazinta lastan julion en Brno, Ĉeĥio.
 - Ewa Grochowska, kiu ricevis multajn internaciajn premiojn pro siaj esperantaj noveloj kaj poezio.
- Chantal Allen, franca esperantistino, gvidis babilemajn sesiojn, kiel dum la franca kongreso en Nantes.
- prelegojn: Libano hodiaŭ, historio de la Universalaj Kongresoj de Esperanto ekde la unua en 1905
- laborrenkontiĝojn : Origamio, japana abako kaj Esperantaj ludoj
- Ekskursojn: du grupoj iris al la « Croix des Veuves » kaj aŭskultis en Esperanto la historion de « Sorbonne plage ».

Kelkaj ĝuis gospelkoncerton ĉe la preĝejo de Plouézec sabaton vespere, kaj aliaj iris danci kun la lokanoj dimanĉe. Mara saŭkraŭto de Maison Oger ĝojigis la gastojn.

Do rendevuu denove venontjare: ĉi-foje dum tri tagoj ekde vendredo la 21-an ĝis dimanĉo la 23-an de aŭgusto 2026.

Noël

Mia Pluezeko 2025

"Mi alvenis ĝustatempe por la granda sensaci'..." (fama kanzono de Persone)

Mi eĉ alvenis antaŭtempe ĉar jam je la oka kaj duono mi stamfis antaŭ la pordo de la renkontiĝejo! Mia forta deziro partopreni la pluezekan semajnfino estis kontentigita. Unue mi volas danki la tutan teamon, kiu intense laboradis por ke ni povu ĝui interrenkontiĝojn de homo al homo (sed homoj kun homoj). Dankon al la bonhumora kaj bonhumura Noël kaj al ĉiuj teamanoj, kiuj senĉese baraktis por ke la renkontiĝo estu sukceso. Granda sukceso estis! Gratulon! Mi ankaŭ aparte varme dankas al Roger, kiu gastigis min kaj kondukis min por vizito de belegaj lokoj.

Kompreneble mi ne povas ĉion rakonti pri Pluezeko 2025 ĉar mi partoprenis nur kelkajn erojn.

Pri kursoj:

Dum la du tagoj mi estis en la grupo de babilantoj. Estas interese ke la organizantoj elektis 3 gvidantojn por tiuj 4 sesioj: la unua kun Paweł, la dua kun Ewa kaj la du lastaj kun Ŝanjo. Kun Paweł mi lernis diversajn gramatikaĵojn, kaj mi interalie eksciis, ke ekzistas interfiksoj! Kun Ewa ni parolis pri Karolo Piĉ kaj lia fama "Litomiŝla tombejo". Antaŭ kelkaj jaroj (Olim!) mi legis tiun libron kaj al mi ege plaĉis liaj avangardaj proponoj! Kaj pri la lastaj sesioj, Ŝanjo brile paroligis nin. Dankon karaj gvidantoj.

Pri niaj liberaj tempoj mi elektis promenadojn. Kun Roger mi vizitis la ĉarman etan templon de Lanleff, la muelejon de Kraka (Ar vilin Kraka en la bretona) kaj la plaĝon de Bréhec kie ni frandis glaciaĵojn. Rigardante la mapon de Pluezeko mi konstatas, ke restas neviditaj vidindaĵoj en tiu bela loko ĉe la marbordo. Mi devos reveni!

La duan tagon ni iris kun Jeanne ĝis Ploubazlanec ĉe la "Kruco de la vidvinoj", kie la pejzaĝoj al la insulo Bréhat, al la maro kaj al "Sorbonne plage" estas mirindaj.



En la renkontiĝejo mi ĝuis kelkajn interesajn programerojn, kiel prelegojn pri Libano (dankon Ewa) kaj pri la UK-

oj, de la unua en Bulonjo-ĉe-Marŝo ĝis la 110a en Brno (dankon Paweł).

Ni ankaŭ feroce batadis per bastono ian buntan krokodilon el kartono, nomatan Pinjata se mi bone memoras. Danke al tiu batado ni frandis bombonojn (ili estis kaŝitaj en ĝia intesto, kaj mi eĉ gajnis libron! Cetere pri libroj mi dankas al Amapola, kiu zorgis pri la libroservo bone provizita. En la korbo de brokantaĵoj, mi ĉerpis libron, kiun mi deziris legi de longa tempo: "Vivi sur barko" de Eugène de Zilah.

Je la komenco de tiu bonega pluezeka aranĝo la urbestro estis kun ni! Li vortigis fortan deziron, ke revenu iam en la "ĉefurbo de Esperanto en Bretonio" (tiel!) grandaj kongresoj kiel en la pasinta ora periodo. Aprioro nun mankas loĝlokoj en Pluezeko por tiuj mirindaj eventoj.

Eble povus esti oportune ankri grandan barĝon ĉe la pluezeka bordo por loĝigi pli ol cent kongresanoj! Kaj tiu barĝo povus esti bona reklamilo por nia afero! (aŭ eble tie konstrui etan insulon kiel "la Respublikon de la insulo de la rozoj" apud Italio en 1968?!)

Vivu, floru kaj brile prosperu Esperanto en Pluezeko kaj en la tuta Bretonio!

Jean Claude Roy

Dum nia unua esperanta renkontiĝo en Pluezeko, ni intervjuis Alexis, kiu partoprenis en la Universala Kongreso ĉi-somere.

Ĉu ĉi tiu Universala Kongreso estis via unua?

Jes. Mi partoprenis en la Eŭropa kongreso en Strasburgo pasintjare sed tiu ĉi estis mia unua Universala Kongreso.

Ĉu vi facile babilis kun aliaj partoprenantoj?

La unuajn tagojn, mi ofte timis erari kaj preferis aŭskulti prelegojn, sed poste mia memfido sufiĉe kreskiĝis kaj mi babilis kun partoprenantoj el multaj landoj (eble mallerte).

El kiaj landoj estis la homoj kun kiuj vi parolis?

Mi parolis kun brazilano, kubano, hispanino, slovakino, germanoj, latvoj, belarusoj, k.t.p.

Kiom da homoj partoprenis en la UK ĉi-jare?

Mi ne scias precize kiom partoprenis sed estis ĉirkaŭ 1070 gealigintoj. Mi estis la aliginto no 1050.

Nun ni parolu pri praktikaj aspektoj de via vojaĝo! Kiel vi veturis Brnon?

Mi vojaĝis per buso ĉar estas la plej malmultekosta kaj ambaŭ la plej praktika veturilo.

Busoj eliras ĉiutage al Brno (trans Parizo) kaj mi ne devis veturi de stacidomo al stacidomo en Parizo (tiu ĉiam ŝtresigas min). La veturado estis longa sed mi plejparte dormis.

Kie vi loĝis en Brno?

Oni povis loĝi en studenta loĝejo sed mi elektis malgrandan hotelon proksime de la stacidomo. Mi pensis ke estos pli praktike kaj marŝi dum 30 minutoj por atingi la kongreson ne timigis min. La sola problemeto estis ke mi ne povis babili kun aliaj partoprenantoj tiel eble kiel ofte.

Same, kie vi manĝis?

La kongresejo situis en universitato, do estis kafejo kaj manĝejo surloke. Alie, Brno estas granda urbo kun multe da restoracioj kaj stratmanĝvendejoj.

Se vi povus ŝanĝi ion en via sperto ĉe UK, kion vi ŝanĝus?

Mi farus pli da ekskursoj. Ĉi-jare, mi plejparte partoprenis prelegojn. Mi bedaŭras ke mi ne ekskursis kun aliaj esperantistoj.

Ĉu vi partoprenos en la venonta UK en Graz ?

Mi ne jam scias ĉu tio eblos sed mi vere ŝatus ĉeesti ĝin.

Klubo de Pluezeko

Okazis : Brezkebil en Douarnenez, 19a-21a de Septembro

Ludema semajnfino en Douarnenez

Ekde 2012, *Rhizomes* agas pri kultura diverseco, per edukado en lernejoj kaj ĉeesto de verkistoj el landoj, kiuj trafas malfacilaĵojn. Lastan septembron *Rhizomes* iniciatis novan festivalon, *Brezkebil*. Ĝi proponas al loĝantoj ludi por malkovri minoritatajn lingvojn parolatajn en la urbo. Ekde la unua renkontiĝo ĝis la evento, pli ol 30 lingvoj estis nombritaj! La ĉefvorto estis: fieru pri via lingvo kaj kulturo. Bonŝance por Esperanto, ni frue aŭdis pri la projekto kaj tiel havis sufiĉe da tempo por prepari la aferon. Murielle kaj Jérôme interesiĝis pri la festivalo kaj kune ni pripensis kiel prezenti nian lingvon. Dum la tuta semajnfino, nekutimaj sesioj allogis la intereson de vizitantoj: mallernado de lingvoj, poezio en *nahuatl*, laŭtegado sur barkoj kaj aliaj senpagaj eventoj kun multaj ludoj por la infanoj. Mesaĝoj kaj proverboj pri la vetero estis skribitaj sur afiŝetoj, en Esperanto: 'printempas' kaj 'sunsubiro'. Kun Murielle, ni partoprenis en *massages littéraires*, literaturaj masaĝoj. Dum masaĝistino disstreĉis volontulon, alia flustris je la orelo en nekonata lingvo dum 10 minutoj. Murielle legis ĉapitron de *la eta princo* kaj mi, enkondukon de *La edzino de l'tempovojaĝanto*, pozitiva sperto por ĉiuj.

Pri la ĉefa evento: *l'archipel des langues*, la duoninsulo de lingvoj, ĉiuj ricevis kiel ruĝa fadeno la temon de ludo. Ni skribis sur la vojo: *Esperanto, notre terrain de jeu est le monde*, Esperanto, nia tereno de ludo estas la mondo. Meze de 20 aliaj budoj, nia titolis: *Avec l'Esperanto, on invente des mots*, per Esperanto, oni kreas vortojn. Infanoj kaj plenkreskuloj ludis per koloraj kubo kaj kreis vortojn, memorebla sperto!

Espereble, tiu-ĉi senkompara festivalo iĝos rapide fama kaj tiel plilarĝigos la koloran pejzaĝon de nia urbeto

Ŝanĝo



Greziljono

Le château espérantiste de Gresillon à 49150 Baugé-en-Anjou vous invite à ses prochains événements espéranto en octobre et avril 2026

- 24 octobre - 2 novembre 2025 ➡ 14^e [AŬTUNAS](#), les vacances espéranto, cours et examen FEI avec *Renée Triolle C1-C2, Dalia Pileckiene B1-B2, Alain Delmotte A1-A2*
- 21 - 28 oct.obre 2025 ➡ [Rencontre chorale](#) avec *Bernard Bigonnet*
- 21 oct. - 6 nov. 2025 ➡ [Chantier collaboratif de bénévolat](#), surtout dans les extérieurs avec *Isabelle Nicolas*
- 17 - 27 avril 2026 ➡ 14^e PRINTEMPAS, cours intensifs et examens KER avec *Zsofia Korody, Birke Dockhorn, Marion Quenut, Paweł Fischer-Kotowski*

AŬTUNAS 2025 PRINTEMPAS 2026 INTERKANT 25-26



INTERKANT

2025-10-21/28

La ĥoro Interkant daŭrigas siajn kantostaĝojn Ekzercado matene kaj posttagmeze, ekde merkredo, (alvenu mardon ĉ. 18h)

- Ĥorestro : **Bernard Bigonnet**
- Kantoj en Esperanto laŭ la kutima repertuaro
- **Koncerto okazos lunde vespere en la festsalono de Baugé**

2026-04-21/05-02

La ĥoro Interkant okazigas 2 provludojn jare kaj ni laboras hejme intertempe.

Paralele okazos **BEMI**-semajno kun Eddy Bosch por biciklantoj kiuj turismos en la ĉirkaŭaĵoj



AŬTUNAS

2025-10-24/11-02

14-a komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj
Kursoj kaj variaj aktivaĵoj, programo por infanoj
KURSOJ

- **Alain Delmotte** : Lernadi per ludo en ĝojo (A1-A2)
- **Dalia Pileckienė** : Litova metodo (B1-B2)
- **Renée Triolle** : Esp-kurso per diskutoj (C1-C2)
- **Ekzamensesio de Franca Esperanto-Instituto**
2025-11-02 je la 9-a horo



PRINTEMPAS

2026-04-17/26

14-a intensiva kursaro por KER-ekzamenoj

- **Marion Quenut** (A1-A2)
- **Zsofia Korody** (B1)
- **Birke Dockhorn** (B2)
- **Paweł Fischer-Kotowski** (C1-C2)

Nia kalendaro-agendo: gresillon.org/a

Armor esperanto .



Armor esperanto invitas vin al la esperanta studperiodo en Saint Brieuc sabaton la 15a kaj dimancon la 16a de novembro, en la departementa domo de asocioj, (nova adreso : 5 strato colette Besson).

<u>Programo</u> : Je la 10a matene	Akcepto kaj kafo
Sabaton:	
10a30 - 12a30	Kursoj : 4 niveloj
12a30	Aperitivo - komuna foto
13a - 13a50	Paŭzo (Kunportu vian manĝaĵon en via sako) + libroservo
14a - 16a	Kursoj : 4 niveloj
16a - 16a30	Paŭzo
16a30 - 17a30	Komuna sesio kun ĉiuj niveloj, kun Ŝanjo kaj Murielle
Dimanĉon:	
10a30 - 12a30	Kursoj : 4 niveloj
12a30 - 13a30	Komuna manĝo : Kuskuso kaj deserto (10 €)
13a30 - 14a	Libroservo - Babilado
14a - 16a	Kursoj : 4 niveloj
16a - 16a30	Ordigo de la salonoj

Instruistoj

- 1- **Komencantoj:** Alain Bournel
- 2- **Komencintoj:** Noël Reysset kaj Aleksandra Roberts
- 3- **Progresantoj:** Elisabeth Le Dru
- 4- **Babilantoj:** diversaj proponoj, trejnado pri bretonaj kantoj kaj ĉendancoj kun Maja kaj Ŝanjo, teatraĵo kun Laurent, legado, tradukado...

Prezoj: - 10 € por 2 tagoj (Senpaga kurso por komencantoj kaj junuloj ĝis 25 ans)
- 10 € por la manĝo de la dimanĉo

Eblos pagi surloke, prefereble per ĉeko por Armor Esperanto

Aliĝilo: Bonvolu sendi ĝin antaŭ la fino de oktobro 2025 al :

Kontakto : Armor Espéranto aŭ **jegoujy@yahoo.fr**
chez Jean-Yves Jégou
7 rue de la fontaine
22 400 Coëtmeux Informoj : Jean-Yves Jégou 06 67 25 49 30



Anoncoj.

Mediterranea esperanto-semajno.



Unu semajna Esperanto-staĝo por ĝui la printempon ĉe la Mediteranea marbordo.

Printempu anticipu! Tri temaj grupoj Komforta staĝejo Elstaraj prelegantoj Bongustaj manĝoj Agrabla vetero Alloga regiono Interesa ekskurso Varma Esperanto-etoso.

Hotelo Miléade - Les Issambres - Francio 14 - 21 de marto 2026

Partopreno en kursoj:

- Kurso 1: kurso por komencantoj kaj komencintoj - Katalin KOVATS (Nederlando - Hungario)
- Kurso 2: paroliga-kleriga kurso pri Esperanto-literaturo - Pawel FISCHER-KOTOWSKI (Nederlando - Pollando)
- Kurso 3: paroliga-kleriga kurso pri mikronoveloj - Maurizio GIACOMETTO (Britio - Italio)

Federacio Espéranto-Provence

Retejo: <https://esperanto-provence.org> - Kontakto: provence.esperanto@laposte.ne

111-a Universala Kongreso de Esperanto

La UK okazos en Graz (Aŭstrio) de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026.

Informoj : <https://uk.esperanto.net/2026/>

Graz (Graco) estas la dua plej granda urbo de Aŭstrio. Ĝi situas meze de Eŭropo kaj estas loko kun historio, spirito kaj bongusto. Kreskinta tra jarcentoj, Graz estas hodiaŭ moderna scienca urbo kun 8 universitatoj kaj fakaj altlernejoj kaj kun vigla kreema medio. Mediteranea vivosento, bona atingebleco kaj kultura heredaĵo, kiu sentblas en ĉiu angulo – jen kio tiel speciale karakterizas la urbon.

Aliĝu antaŭ la fino de la jaro por ĝui rabaton !



El unua bulteno

Fremdaj vizitantoj.

Vida, litova esperantistino, vizitis Bretonion

Lastan printempon, ni gastigis litovan esperantistinon: Vida. Kiel ni renkontiĝis?

Iam, mi legis anoncon en esperanta gazeto kun peto pri korespondado. Esperantistino deziris plibonigi sian francan lingvon kontraŭ instruado de Esperanto.

Ni ekkomencis korespondi skribe sed rapide ni elektis videobabili. De tiam ni daŭrigas interparoli merkrede vespere dum unu horo.

Ni invitis ŝin antaŭe, sed neatenditaj eventoj en ŝia regiono malfruigis la vojaĝon.

Finfine ni renkontiĝis en majo kaj Vida vizitis nian belan Bretonion. Ni veturis laŭ la suda marbordo ĝis la pinto de Raz.



Survoje al Vannes, ni tranoktis en Douarnenez ĉe nia amikino Ŝanjo. Ŝi instruiis Vida-n kiel kuiri fagopirajn krespojn. La sekvantan tagon, ni haltis kompreneble en Karnak (Carnac) kaj Lokmariaker (Locmariaquer) por admiri megalitajn monumentojn. Okazis nokto-festo (Fest noz) kie Vida lernis bretonajn dancojn kun ĝojo.

En Vannes, ni organizis tagmanĝon kun esperantistoj. Vida bonŝance ĉeestis dum la golfa semajno (La semaine du Golfe), tiel ŝi ĝuis la spektaklon de kelkaj belegajvelŝipoj. Ŝi deziris nepre malkovri tajdojn ĉar, en Litovio, tajdoj estas sensignifaj.

Ni kune pasigis ne forgesblan semajnon.

Pierre Jaffré, Vannes



Vizito de Iza kaj Damien

Kia ĝojo trovi niajn du amikojn kun siaj du gefiloj, alvenantajn el departemento Allier, por viziti siajn bretonajn amikojn.

Iza kaj Damien loĝis dum kelkaj tagoj ĉe paro de Plouisy, kaj venis renkonti nin en Bégard por komuna manĝo. Gaja etoso kun multaj infanoj ludantaj sur la granda saltoreto (trampolino). Dume, ni plenkreskuloj, rememoris la bonajn tempojn antaŭ dek jaroj, kiam Iza kaj Damien estis « woofeurs » ĉe nia domo, helpante nin ĝardenumi kaj prepari ekipoĵojn por la abelujoj. Ĉiutage post la laboro, ni nepre malfermis la Bek-kurson de Dennis Keefe, kaj mi instruis al ili la bazaĵojn de Esperanto. Post semajno, Iza komencis bone komuniki kun mi. Ili vere entuziasmiĝis pri Esperanto.

Poste ili loĝis en Morbihano, daŭrigis la lernadon kun Manjo, kaj eĉ instruis en Pluvigner.

Ili prepariĝis por sia granda biciklado tra la mondo (vidu foton). Ĝi daŭris tri jarojn. Ŝajne, estis Covid, kiu okazigis la finon de la aventuro.

Do, post nia revido en Bégard, ni retrovis unu la alian dum la pluezekaj renkontiĝoj. Riĉa programo : kursoj, prelegoj, ludoj, vizitoj, dancoj, ktp.

Iza parolis al mi pri sia intenco instrui Esperanton al la gefiloj. Mi donacis al ŝi dudekon da libroj, kiujn mi havis duoble en mia biblioteko. Mi certas ke, kiam ili revenos al Bretonio, la infanoj scios paroli Esperanton.

Maja





La arbarherbejo de esperantistoj kaj la jubilea kverko

La historio de la arbarherbejo kaj kverko datiĝas de la jaro 1927 kiam en Gdansko okazis la 19a Universala Kongreso de Esperanto ligita kun la 40a jubileo de la ekesto de Esperanto. Por solenigi tiujn okazintaĵojn la estraro de la urbo Sopot donacis al esperantistoj pecon da marĉa grundo en la „Świemirowska” Valo, apud la fonto de la malgranda rojo, nomigis la terenon „Esperantogrund” (Tero de Esperanto) kaj fondis la memortabulon. La marĉejo estis surŝutita per la tero por formi tie herbejon kaj sur la strato, ĉe la pado gvidanta al la herbejo estis starigita la ŝtonego kun cizita en ĝi la germana vorto „Esperantoweg” (Esperanto-vojo).

La 31an de julio 1927 sur la arbarherbejo kunvenis la reprezentantoj de pli ol 30 landoj, kiuj alportis kun si la patrolandan teron por surŝuti ĝin sur la radikojn de la plantata kverko – roburo. Malkovrita estis ankaŭ la memortabulo sur la ŝtonego.



La jubilea kverko kreskis nur 11 jarojn, ĉar en la jaro 1938 ĝi estis forhakita de hitlerana batalgrupo, dum la memortabulo estis forprenita kaj la monumento detruita. Restis nur la memorŝtonego ĉe la pado.

Fine de julio 1959, por solenigi la centjariĝon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof okazis en Gdansko la 15a Internacia Junulara Kongreso de TEJO antaŭiganta la 44an Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio. Kaj denove kunvenis la junaj esperantistoj el diversaj landoj sur la arbarherbejo, por partopreni en la rea plantado de la kverko. Tiu ĉi kverko devenis el la ĝardeno de la familio Spirowski, semita de la juna Harry en 1938 jaro. Malkovrita estis ankaŭ samtempe la nova memorŝtonego en la loko de la tiama tabulo, sur kiu estis cizita la teksto en Esperanto priskirbanta la historion de tiu ĉi loko. Kaj sur la ŝtonego ĉe la pado al la herbejo cizita estis la plua vorto „Dąb” (Kverko).

Pri la pretigado de la loko kaj flegado de la kverko kaj ĝia ĉirkaŭaĵo okupiĝas senĉese la familio Spirowski.

En novembro 2013, laŭ la propono de la sopotaj esperantistoj, la Konsilantaro de la Urbo Sopot alprenis la decidon doni la nomon TORENTO al la sennoma ĝis nun roĝo trafluanta najbare de la E-kverko, kiun nomon kiel la geografian konfirmis la Ministerio pri Administrado kaj Cifrizado.

La urbo Sopot situas je 12 km de Gdansk, norde de Pollando

Laŭ flugfolio donacita de Jozef Czescik.

Lastaj novaĵoj pri la projekto de Francis Hallé

Ni memorigas al vi, ke la projekto de Francis Hallé estas **kreado de pra-arbaro de 70 000 ha dum longega tempo, tiel estas 10 jarcentoj, en Eŭropo**. Vidu la artikolojn en la lastaj « Verda Triskelo ».

Laŭ la deklaroj de Eric Fabre, Ĝenerala Sekretario de Francis Hallé Asocio por Pra-Arbaro.

« La disvolviĝo de nia projekto postulas esplorklaboron. Ni mem iniciatas proponojn kaj kunlaboras kun aliaj aktoroj por efektiviĝi tion. Tiuj projektoj koncernas la lokigon kaj efektivigon - je la loka, nacia kaj internacia niveloj - de la estonta grandega arbaro.

Plie, multe gravas la lokaj kunvenoj, kiuj okazas en la regiono « Grand-Est » kaj alie. Tiuj kunvenoj atestas la eksterordinaran scivolemon, kiun la propono de Francis Hallé vekas. Ili estas viglaj momentoj de informo, konsultado, aŭskultado kaj kolektiva imagopovo.

Tiu loka laboro starigas rilatojn kun vasta kaj diversa publiko. Diverseco laŭ lokoj, zorgoj kaj generacioj, ĉi tiuj altvaloraj momentoj de dialogo rivelas konscion pri la urĝeco de grandskala agado fronte al la ekologia krizo. Ĝi rivelas ankaŭ la bezonon pensi plu antaŭen, kaj la zorgon pri transdono de altvaloraj komunaj havaĵoj al estontaj generacioj.

En 2022, Franz Timmermans, tiama Unua Vicprezidanto de la Eŭropa Unio, sendis leteron al Francis Hallé :

« La projekto, kiun vi defendas, estas aparte grava en la kunteksto de vera ekologia transiro (...) Ĝia transgeneracia kaj translima naturo estas vere unika kaj ebligas la efektivigon de pakto por la restarigo de la naturo inter generacioj. »

Krei la kondiĉojn por la revivigo de pra-arbaro postulas malfermi spacojn por demokratia dialogo pri la temoj rilataj al la libera evoluo kaj natureco de arbaroj. Ĉi-jare ni partoprenas serion da laborrenkontiĝoj kaj konsultoj, kiuj kunigas diversajn aktorojn : administrantojn de protektitaj areoj, lignolaboristojn, ekskursantojn, uzantojn kaj lokajn asociojn.

Ekzemple, lastmonate ni partoprenis en laborsesio organizita de la kooperativo Acadie en la Nacia Arbara Parko, kreita en 2019, lime inter la regionoj « Grand-Est » kaj « Bourgogne-Franche-Comté ». Ĝi estis okazo por interŝanĝi pri spertoj de francaj parkestroj, kaj iliaj germanaj kolegoj en la Parko Hunsrück Hochwald.

Ni ĝojas vidi, ke tiuj momentoj de renkontiĝo kaj debato multiĝas, akompanante nian asocian vojiron paŝon post paŝo. »

Por pli informiĝi :

- Filmo « Nov-Zelando, la arbaro de gigantoj » (« Nouvelle-Zélande, la forêt des géants » de Julie Merckling
- Filmo « En la re-sovaĝiĝon », (« Into the rewild », « Réensauvagement »), d'Arnaud Hiltzer. Parto de serio da dokumentaj filmoj pri resovaĝiĝo
- Eduka ilaro (kit pédagogique) : « Naturaj arbaroj », (« Forêts naturelles »), kiun oni povas mendi al la asocio Francis Hallé.

Por paroli pri libera evoluo ĉirkaŭ vi, al juna publiko aŭ ne-specialistaj plenkreskuloj, la asocio kunmetis edukan ilaron, kiu provizas ŝlosilojn por rakonti la historion de la natura arbaro.



La klubo de Lannion

Arango : Hélène Dubois - 06-68-15-32-62 - helene22dubois@gmail.com - 14 chemin de Land Gily 22300 Saint Michel en grève :

Prolegado Chantal Allen - 06-74-15-78-09 chantalallen9@gmail.com korektado Josette Ducloyer jducloyer@gmail.com

N'attendez pas la prochaine édition, envoyez vos articles à Chantal dès maintenant pour les voir apparaître dans le prochain VT (par courrier ou par internet).

La naŭ instruistinoj el Parnaso

Kolora papago, sidante sur gitaro, invitas leganton malfermi libron, kies titolo surprizas: « Aliaj pordoj malfermiĝas ». Rakonto entenas karajn temojn de la verkistino Luiza Carol, kun infanoj, plantoj kaj dombestoj kiel herooj vivante, songante kaj revante en muzika fono. Eskapi el kruela realeco per adaptado kondukas al pozitiva konkludo. En la unua, Dorela, knabineto de familio de kantistoj, gitarludas kaj instruas Dodo-n, verdan papagon, solfeĝi. Pro malsano, revoj forflugas sed patrino mildigis la ĉagrenon : « Kiam unu pordo fermiĝas, aliaj pordoj malfermiĝas. La vivo plenas je surprizoj. »

Lasta rakonto malsimilas kaj allogas scivolemon : « La naŭ instruistinoj el Parnaso » pritraktas obsedan teran demandon pri ekzistado de aliplanedoj. Interpreto de grekaj antikvaj legendoj proponas respondon.

Antaŭ tre longe, inter galaksioj, regis universo popolata de aliplanedoj, la dioj el Parnaso, kiuj interagis kun antikvaj teranoj senpredikte kaj kapriĉe. Tiu maniere, homoj, kies vivo ŝajnis ligita al nekomprenebla sorto, trovis respondon. Tiuj ĉi superaj estaĵoj regis la tagan vivon de humilaj homoj, kiuj provis protekti sin per konstruaĵo de temploj kaj obeado al ritoj. Tiel ili plaĉis al la dioj de Parnaso, kiuj uzis hipnoton por influi la teranojn bone aŭ malbone kaj fariĝis nevideblaj por la homaj okuloj. Dioj ankaŭ kapablis aliformiĝi en aliajn estaĵojn.

Laŭ onidiroj sur la greka montaro Parnaso loĝis Zeŭso, ege potenca reĝo super la diaro kaj homaro. Liaj naŭ ege talentaj filinoj kompatis homojn kaj deziris helpi ilin por plibonigi ilian vivon. Mnemozino, la patrino, scipovis influi la memorkapablon. Jen la naŭ muzoj, kiuj inspiris talentajn homojn pri artoj. Erato, la aminda, verkis ampoemojn. Polimnio, la himnara, kreis himnojn pri vivĝojo. Kaliopo, la belvoĉa, kantis eposojn, kiuj rilatis al herocaj agoj kaj filozofio. Lernantoj komencis verki teatraĵon kaj imagi paralelan mondon for de taga rutino kaj sufero. Poecema pensmaniero komencis integriĝi en la ĉiutaga vivo. Eŭterpo, la muzikema, kaj Terpsikoro, la dancema, inspiris artistojn. Talio, la floranta, kaj Melpomeno, la melodia, helpis aktorojn deklami. Fine, Uranio, la ĉiela, scipovis pri la futuro kaj Klio, la raportema, antaŭvidis la estontecon de estaĵoj. Tiu kapableco de homoj altiĝis kaj riskis konkurenci la diojn. Ĝi aperis kiel danĝera evoluo por Zeŭso.

La rakonto pritraktas la fonton de inspiro. Talento temas ĉefe pri arto. Kompatindaj muzoj provas malpliigi limojn inter dioj kaj teranoj por plibonigi ilin. Muzoj elektas kelkajn individuojn, donas inspiron, kreas talenton, poste artistoj helpas altigi la menson de homoj, kiuj bezonas kreemon, supre de la rutina tago.

La verkado fluktuas inter fikcio kaj realeco, antikveco kaj moderneco tra universalaj trajtoj. Ekde kiam la mondo estas mondo, necesas trovi respondon al la homara sorto. Bonŝanco-malbonŝanco, sano-malsano, vivo-morto, justeco-maljusteco ktp. Antaŭ tre longe « La Teron vizitis aliplanedoj, kiuj similis homojn ». Pli ol legendo, la prisribo malŝlosas nian imaginaran mondon kun mistero : ĉu aliplanedanoj troviĝas sur la tero ?

Legu kaj ĝuu.....

Ŝanjo

Pri la baldaŭa libro “OMAĜO AL VERDI KAJ PUCCINI”

Luiza Carol sendis al VT enkondukon de libro baldaŭ eldonita.

Jen kiel aperis tiuj ok porscenejaj beletraĵoj

Ekde mia adolesko, mi starigis propran kriterion por pritaksi la beletraĵojn kiujn mi legas: ju pli da tempo la koncerna beletraĵo instigas min mediti pri ĝi, des pli ĝi valoras por mia animo. Iuj beletraĵoj ja interesas min, eventuale ĝojigas aŭ amuzas min dum la tempo de legado, sed poste mi ne plu pensas pri ili kaj ili malaperas el mia vivo, eĉ se iliaj aŭtoroj estas ege famaj kaj alte pritaksataj en lernejoj kaj manlibroj kaj enciklopedioj. Aliajn mi memoras dum jaroj aŭ jardekoj, kaj iujn eble neniam forgesos, eĉ se ili estas malpli popularaj. Tiaj ĉi legaĵoj

enmiksiĝas en mian vivon, kaj ties protagonistoj fariĝas miaj konatoj, kun kiuj mi interrilatas en miaj pensoj, ĉar mi plene aŭ parte kunsentas aŭ malkunsentas kun ili. Tiajn legaĵojn mi deziras kelkfoje relegi je diversaj aĝoj, por eventuale malkovri en ili aspektojn kiujn mi ne vidis antaŭe. En tiaj okazoj, mi povas havi surprizojn, ĉar intertempe mi maturiĝas, do miaj novaj reagoj povas eventuale malsimili al la antaŭaj. Kaj mi esperas resti ĉiam malfermita por novaj perspektivoj pri malnovaj legaĵoj.

Sed kion pri la operlibretoj? Ankaŭ tiuj estas beletraĵoj, sed ili estas nur partoj el spektakloj, en kiuj literaturo miksiĝas kun muziko, aktorado, vidartoj kaj danco. Ne literaturo, sed muziko estas la plej grava ingredienco de la operspektakloj, precipe kiam temas pri tiom elstaraj komponistoj kiel Verdi kaj Puccini. Kiam oni legas operlibreton sendepende de la aliaj aspektoj de la spektaklo, ĝi ŝajnas tre ofte malpli alloga ol la muziko, precipe pro tio ke la teksto devas kongrui kun la postuloj de la melodio kaj eĉ kun la kapabloj de la kantistoj. Iusence, la libretoj de la plej famaj operoj de Verdi kaj Puccini ŝajnas “eksmodiĝi” post tiom da jaroj, dum la muziko (precipe la plej bone konataj arioj) daŭre allogas la publikon preter ajna modo. Do okazis tiel, ke mia ĵus asertita propra kriterio simple ne povis funkcii koncerne operlibretojn. Kial? Ĉar malgraŭ tio, ke ili tiom algluiĝis al mia memoro, mi ne tro alte aprezis ilian literaturan valoron.

Tio signifas, ke la protagonistoj de la operoj revenis ree kaj ree en miajn pensojn, nur danke al la belegaj operspektakloj kiujn mi ĝuis. Adoleskantoj estas ofte tre (tro) kritikemaj, kaj mi ne estis escepto. Pri la belegaj melodioj mi tute ne estis kritikema, ĉar ili fascinis min. Sed la libretojn mi ofte ironiis, kelkfoje primokante akre la protagonistojn en mia menso. Dum la tempopaso, tiu malkongruenco inter miaj sintenoj koncerne la muzikan kaj la literaturan flankojn de la operspektakloj komencis ĝeni min, ĉar operspektaklo estas unueca, do oni ne povas ĝui nur la muzikon aŭ nur la libreton. Iom post iom, mi komencis solvi tiun ĝenantan problemon: mi komencis iel larĝigi en mia menso la limojn de la libretoj. Pri la protagonistoj mi imagis biografiajn detalojn, kiuj en la libretoj ne aperas, sed laŭ mi povus igi la tutan agadon pli interesa. Ŝajnis al mi, ke ĉiu rolulo kaŝas misterojn, kiujn mi sentis la bezonon solvi. Tiel mi imagis eventojn okazintajn antaŭ ol la protagonistoj aperas sursceneje, kaj ankaŭ eventojn okazontajn post kiam la spektaklo finiĝas. Fakte mi imagis diversajn prologojn kaj epilogojn, en kiuj rolis, krom la protagonistoj de la koncernaj libretoj, ankaŭ novaj roluloj elpensitaj de mi mem. Okaze de ĉiu nova vizito al la operteatro kaj okaze de ĉiu nova spektado pere de DVD aŭ televidilo aŭ jutubo, mi imagis novajn prologojn kaj epilogojn. Al tiuj aldoniĝis imagajn dialogojn inter la kantistoj provantaj identiĝi kun siaj roloj. Kelkfoje aldoniĝis ankaŭ imagajn dialogojn inter spektantoj provantaj kompreni la personecojn de la protagonistoj.

Ĉirkaŭ la aĝo de 50 (do ĉirkaŭ 1997), mi komencis verki tiajn imagajn teatraĵetojn ne nur mense, sed ankaŭ sur la ekrano de la komputilo. La unuajn mi verkis kaj publikigis en la rumana, poste ankaŭ en la angla kaj lastatempe en Esperanto. Kelkfoje mi reverkis malnovajn teatraĵetojn ŝanĝante fragmentojn, sed plej ofte mi elpensis tute novajn verkojn, ŝanĝante eĉ la protagonistojn, fokusigante mian atenton jen al unu jen al alia protagonisto de la koncerna opero.

En la sama jaro (1997), mi elektis ok el la plej konataj operoj de Verdi kaj Puccini, kaj planis verki libron ligitan de tiuj operoj. Por ĉiu elektita opero, mi volis imagi prologon, epilogon, dialogon inter la kantistoj kaj dialogon inter spektantoj, tio estas po kvar teatraĵetojn por ĉiu el tiuj ok operoj. Do la planita libro devus enhavi entute 32 teatraĵetojn.

La projekto ne efektiviĝis ekzakte laŭplane, sed ĝi estis la deirpunkto de tiu ĉi libro. La tuta aventuro evoluis tiel: mi realigis dekojn da porscenejaj beletraĵoj pri la elektitaj ok operoj, sed neniuj el ili estis prologo. Tamen, la roluloj de la epilogoj ofte komentis abunde ne nur pri eventoj okazintaj en la koncerna operlibreto, sed ankaŭ pri antaŭaj eventoj. Tio signifas ke, iusence, kelkaj prologoj kunfandiĝis ene de la epilogoj.

Dum preskaŭ tri jardekoj mi havis tiun grandan projekton en mia menso. Intertempe mi scivolis akiri pli da historiaj konoj rilate la antikvan Egiption kaj la antikvan Etiopion (la Aksuman reĝlandon) por senti min pli proksime de la protagonistoj de “Aida”. Precipe interesis min informoj pri la mitologioj kaj tradicioj de tiuj antikvaj popoloj, pri la periodo de la faraono Akenatono, pri la antikva egiptia tradicio de meditado kaj fizikaj ekzercoj (el kiu evoluigis la nuna tiel-nomata “kemetika jogo”), pri la sociaj rilatoj inter sklavoj kaj iliaj mastroj,

pri la tiama eduksistemo, pri diversaj aspektoj de tiama ĉiutaga vivo ktp. Mi ankaŭ provis plilarĝigi miajn konojn pri la japanaj tradicioj, por senti min pli proksime de la protagonistoj de “Madama Butterfly” (“Damo Papilio”).

La nuna libro enhavas ok porscenejajn beletraĵojn, po unu por ĉiu el la ok operoj kiujn mi elektis ekde la komenco de tiu ĉi aventuro. Tiujn ĉi beletraĵojn mi verkis originale en Esperanto ekde la jaro 2022. Krom teatraĵojn, mi inkludis monologojn kaj unu porscenejan baladon. Mi vicigis tiujn ok porscenejajn beletraĵoj laŭ la kronologia ordo de la koncernaj operpremieroj.

Kun la tempopaso, multe mildiĝis la kritikemo de mia juneco koncerne operlibretojn. Kompanse, akriĝis mia kritikemo koncerne miajn proprajn verkojn, tial la epilojoj kaj la monologoj verkitaj antaŭ 2022 ne plu kontentigas min nun. Ŝajnas al mi ke la lastatempaj teatraĵoj perdis (preskaŭ) ĉion el la ironia kaj parodia tono de tiuj verkitaj antaŭ longe. Mi kreis tiun ĉi libron kun granda respekto kaj danko pro la belaj perspektakloj, kiuj riĉigis kaj daŭre riĉigas mian vivon.

Tiuj porscenejaj beletraĵoj ne postulas de la legantoj (eventuale spektantoj) antaŭajn konojn de la koncernaj perspektakloj, nek postulas ŝati opermuzikon. Tamen mi tre ĝojos, se miaj verkoj kapablos instigi iujn ekkoni la koncernajn majstroverkojn de Verdi kaj Puccini, aŭ stimuli iujn spekti ilin denove, por eventuale trovi novajn perspektivojn en ili.

Luiza CAROL naskiĝis la 1-an de marto 1947 en Bukareŝto (Rumanio) kaj loĝas en Israelo ekde 1980. Ŝi estas verkistino. Luiza Carol skribas por infanoj kaj/aŭ por plenkreskuloj: poemojn, prozaĵojn, teatraĵojn, kantojn, eseojn, tradukojn. Ŝi publikigis en la rumana (ekde 1969), en la angla (ekde 1981) kaj en Esperanto (ekde 2006). Ŝiaj verkoj estis tradukitaj en multajn lingvojn. Ŝi estis premiita en la [Belartaj Konkursoj](#) de [UEA](#). Novelo ŝia aperis en "Vizaĝoj" (2010).^[1] Ŝi kunlaboris en diversaj medioj ekzemple en la gazetoj [Beletra Almanako](#),^[2] [La Karavelo](#) ktp.

Elektitaj libroj

- “Rakontoj por ĉiuj aĝoj” (2009) – rakontoj por infanoj kaj/aŭ plenkreskuloj.
- “Tikiriki Tok el strobilo” (2017) - rakontoj por infanoj kaj/aŭ plenkreskuloj.
- “Kantoj por geamikoj” (2018) – kantoj por infanoj kaj/aŭ plenkreskuloj.
- “Aliaj pordoj malfermiĝas” (2020) – rakontoj por infanoj kaj/aŭ plenkreskuloj.

Petro Palivoda

Ukraina amiko, Petro Palidova, sendis al Ŝanjo poemon, kiun li verkis antaŭ la milito. Se vi deziras komenti, kontaktu Ŝanjo-n.

Mi kredas

La luno brilas sur la nokta ondo,
Kaj lumas hele steloj tra l’eter’...
Ekdormu kalme, maltrankvila mondo,
Ripozu de malĝojo, kara Ter’.

Detruas vin militoj kaj suferoj,
Turmentas vin malamo kaj dolor’,

Sed vivas tamen en la kor' esperoj
Al via bona kaj feliĉa hor'.

Ni strebu al paco, infanoj de l' Tero,
Aspiru la celon kun arda pasi',
Per lingvo komuna kaj en harmoni'!
Mi kredas je amo, feliĉo kaj vero!
Homaro, mi kredas je vi!

Ni ofte flugas pense al ĉielo,
Nin ebriigas alto kaj liber',
Allogas nin kaj ravas Dia belo
En ĉiu flor', nubeto kaj roser'.

Sed pafojn sonĝas beb' en sia lito -
Kaj super ĝi kliniĝas la patrin',
Ŝi sian bebon gardas de milito,
Kaj estas nia devo helpi ŝin.

Ni strebu al paco, infanoj de l' Tero,
Aspiru la celon kun arda pasi',
Per lingvo komuna kaj en harmoni'!
Mi kredas je amo, feliĉo kaj vero!
Homaro, mi kredas je vi!

Petro PALIVODA, el Kievo, estas ukraina kaj Esperanta poeto kaj tradukisto en Kievo, Li verkas en la ukraina, la rusa, la germana lingvoj kaj originale en Esperanto. Liaj tradukoj aperis en pluraj ĵurnaloj, revuoj, almanakoj, antologioj en Ukrainio, Rusio,

Petro Palivoda estas esperantisto ekde 1976.

Li tradukis multajn poeziojn al Esperanto, estas aŭtoro de poeziaj libroj kaj kantverkisto.

Gajninto de *Beletraj Konkursoj-2025* de la Universala Esperanto-Asocio en la kategorio "Kantoteksto" (1-a kaj 2-a premio), laŭreato de "Liro-82", Kaliningrad, Rusio (3-a premio, poezio), kaj de multaj aliaj premioj naciaj kaj internaciaj.

Liaj verkaĵoj estas tradukitaj kaj aperigitaj en la germana, la kroata, la itala, la korea kaj la franca lingvoj.

Li estas la patro de Oksana kaj avo de Solomia kaj Lada, kiuj estis akceptitaj ekde 2022 en bretonaj esperantistaj familioj kaj nuntempe loĝas en Douarnenez.

Farendaĵoj notindaj en via kalendaro



Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Greziljono

Kurso por kaj instruistoj kaj instruantoj de
esperanto, Dennis Keefe
29a kaj 30a de Novembro en Saint Brieuc

Rencontres Espéranto

Plouézac

21-23 Août 2026

Congrès Espéranto France

Hérouville Saint Clair

22-25 Mai 2026



Universala kongreso 2026
Graz (Aŭstrio)
De la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 2026

<https://uk.esperanto.net/2026/>

AŬTUNAS : De la 24a de oktobro ĝis la 2a de novembro

intensivaj kursoj por ekzamenoj kun 3
famaj instruistoj

Ĥora (korusa) renkonto kun Bernard
Bigonnet

De la 21a ĝis la 28a de oktobro

Volontula komuna laboro

De la 21a de oktobro ĝis 6a de novembro.

14a PRINTEMPAS

De la 17a ĝis la 27a de aprilo 2026

Informoj en

<https://gresillon.org>